Mi apud fenestro sidas

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart Amzeev

Mi apud fenestro sidas.
Ankoraŭ varmigas min suno.
Sed mi nenien rapidas.
Jam estas aŭtuno,
jam estas aŭtuno.

Kaj mia memoro estas
kiel plene skribita kajrero.
Trapasis nelonga festo,
foriris somero,
foriris somero.

Donacos al mi vintro longa
laciĝon de tagoj severaj.
Al multaj demandoj – respondojn.
Kaj nepre esperon,
kaj nepre esperon.

Mi vintron travivos po tage.
Pro longa malvarm' mi aliiĝos.
Printempo min ree atakos
kaj fest' ripetiĝos,
kaj fest rieitiĝos.